



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

N-ro 26./77 - 30 jun 1977
Aperas ĉiusemajne

GOD
UNDERSTANDS ESPERANTO

Luxembourg
Weekly

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pöckel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

Esperanto in Luxemburg

Pastro Kindler-Triksini furoras en Luksemburgo

Hansjörg Kindler l'ambassadeur des Espérantistes



Werbung für die internationale Sprache ... jetzt auch mit dem Auto



Das ist der katholische Pfarrer Hansjörg Kindler, genannt Triksini. Ob Sie ihn nun als Seelsorger, Esperanto-Lehrer oder als Zauberkünstler brauchen, er ist immer für Sie da.

But what kind of effect will Esperanto have on the European Communities?

"We will always need translators and interpreters, but the time when heads of state can speak completely fluently with each other as if in their mother tongue is extremely important. But I think it is sad if toilets still have to be marked in 10 different languages."

Pastor mit Zauberstab

Luxemburg hat auch seinen Don Camillo. Zwar streitet er sich nicht mit Kommunisten herum, dafür aber mit Übersetzern. Denn sein Ziel ist es Esperanto als neutrales Verständigungsmittel in alle internationalen Beziehungen einzuführen. Sein Name ist Hansjörg Kindler. Er ist katholischer Pfarrer. Nebenbei zaubert er, spielt Puppentheater und lehrt Esperanto. Sein Künstlername: Triksini. Triksini ist eine dermaßen originelle Figur, daß wir Ihnen, liebe Leser, (im Telegramm-Stil) einen Einblick in sein turbulentes Leben geben wollen.

Auch Gott versteht Esperanto...

...sagt Triksini: Auf der ganzen Welt sprechen jetzt Millionen Menschen in 30 Ländern diese sehr leicht zu erlernende Sprache. Möchten Sie sich auch Esperanto aneignen? Dann rufen Sie doch mal während der Bürostunden bei Triksini an. Tel. 47 00 39. Er gibt Ihnen gerne weitere Informationen.

Esperanto, die Lösung des europäischen Sprachenproblems?

LUXEMBURGER WORT

Ein Pfarrer wechselt auf Grün um
Hansjörg Kindler übernimmt demnächst das Esperanto-Zentrum
in Luxemburg/Zamenhofs Weltsprache im Aufwind

Pri nia titolpaĝo

Pastro Kindler-Triksini furoras en Luksemburgo

La situacio en Luksemburgo rilate al Esperanto radikale ŝanĝiĝis depost kiam pastro Kindler-Triksini agadas tie favore al la internacia lingvo. La Luksemburgaj gazetoj, kiuj ĝis antaŭ nelonge silentis pri Esperanto, nun multe skribas pri la Esperanta agado en ĉi tiu lando. Sur la titola paĝo ni publikigas surskribojn kaj fotojn el jenaj gazetoj: Luxemburger Wort, Tageblatt, National- und Bistumszeitung, Luxembourg Weekly, Lux-Post kaj Republicain Lorrain.

Pastro Kindler baldaŭ malfermos Esperanto-Centron kaj jam startis per nova aŭtomobilo! La 15-an de junio okazis en la Domo de Eŭropo (Maison de l'Europe) preleĝo pri la perspektivoj de Esperanto.

Weltsprache und Weltwirtschaft

Disertacio pri Esperanto el la jaro 1924

Luksemburgo (pp) - Jus aperis doktoriga disertacio pri Esperanto de Esperanto-pioniro el la jaro 1924 sub la titolo "Weltsprache und Weltwirtschaft" (Mondlingvo kaj monda ekonomio) "Inaugural-Dissertation zur Erlangung der Doktorwürde einer Hohen Philosophischen Fakultät der Bad. Ruprecht-Karls-Universität zu Heidelberg vorgelegt von Friedrich Leidinger aus Mannheim W.S. 1924/25". La nuna eldono, farita de pastro Kindler-Triksini, estas faksimila represo, formato DIN A 4, 143 p.

La aŭtoro Dr. Friedrich Leidinger naskiĝis en la jaro 1902 en Köln kaj mortis en 1962 en Konstanz; li estis registara konsilisto (Regierungsrat).

El la enhavo:

Enkonduko: La esenco de la lingvo ĝenerale kaj de la artefaritaj helplingvoj speciale

1-a ĉapitro: Mondlingvo kaj mondhelplingvo kiel trafikiloj de la internaciaj ekonomiaj rilatoj

2-a ĉapitro: La problemo de internacia helplingvo kaj Esperanto

3-a ĉapitro: Esperanto kiel kultura faktoro

4-a ĉapitro: Esperanto kiel ekonomia faktoro

II-a parto: La signifo de Esperanto kiel helplingvo por la mondekonomiaj rilatoj

A: Esperanto kaj la monda trafiko

B: Esperanto kaj la monda komerco

C: Esperanto kaj la ceteraj plej gravaj kampoj de la monda ekonomio

Fino: Esperanto kiel rekonstrua faktoro

Oni devas danki al la vidvino de la aŭtoro, s-ino Maria Leidinger, ke ŝi transdonis la manuskripton kun ĉiuj rajtoj al pastro Hansjörg Kindler, kaj al li kiu eldonis ĝin en kvanto da 1000 ekzempleroj.

Por germanlingvanoj tiu eldonaĵo estas grava historia dokumento pri la stato de Esperanto en tiu por la internacia lingvo tiom favora epoko, ĝi estas bona kontribuado por la germanlingva literaturo pri la problemo de internacia lingvo, kaj ĝi estas riĉenhava fonto pri bibliografiaj indikoj por ĉiuj tiuj kiuj volas pliprofundigi en la temo.

La prezo estas 10,- GM + 1,50 GM por ekspedkostoj. Mendu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2773, D-8500 Nürnberg. Libroservoj mendu ĉe: Hansjörg Kindler, Postfach 175, Luxembourg.

Ekspozicio de la Aŭstria Nacia Biblioteko

Enmeze de la rave baroka belo de sia vanta librosalonego la Aŭstria Nacia Biblioteko ĵus inaŭguris rimarkindan ekspozicion de specimenoj tipaj por la multspecaj kaj multnombraj libroj, atlasoj, manuskriptoj, portretoj kaj aliaj dokumentaj trezoraĵoj akiritaj dum la pasinta jardeko.

Por biblioteko, kiu ĉiun tagon enkatologigas preskaŭ centojn da tiaj akiraĵoj, dek jaroj estas longa tempo. Do la superrigardo pri tiuj akiraĵoj egalas superrigardon pri nia tuta spirita kaj intelekta kulturo. Des pli, ĉar bone instruaj etiketoj, suplementataj per plurliniaj klarigoj interligas ĉion, kio alie povus eble impresi kiel izolita, se ne kvazaŭ fragmenteca. En unu el la vitrinoj oni vidas, ekzemple, papirusojn - unu en la por laiko senesperige difektita stato, en kiu oni trovis ĝin, la alia lertege restaŭrita, t.e. riparita, renovigita, farita ree legebla laŭ procedo koncize kaj populare priskribita sur aldonita folio.

Preskaŭ ducentjara poŝta kvitancoformularo, plenigita rilate al enpagita afranko por ekspedo de pakaĵo, revivigas por ni momenton el la ĉiutago senpere antaŭ la eksplodo de la Granda Franca Revolucio kaj kontrastas kun la ankoraŭ aktualaj fotoj, kiuj dokumentas por estontaj generacioj la konstruadon de la viena subtera fervojo.

La menciitaj ekspoziciaĵoj reprezentas samtempe la koncernajn specialajn kolektojn de la Nacia Biblioteko, kiuj havas ĉiu sian konsiderinde aŭtonoman direkcion: La Papirusa Kolekto, la Kolekto de Geografiaj Kartoj, la Muzik-Kolekto, la Teatra Kolekto, la Bild-Arkivo. Al tiuj specialaj kolektoj aŭ sekcioj de la Nacia Biblioteko apartenas ankaŭ la Internacia Esperanto-Muzeo de Vieno, kiu malgraŭ sia nomo estas ĉefe biblioteko. Kompreneble ĝia direktoro, a-ro Walter Hube, bone konata tutmonde en Esperantaj rondoj, zorgis por ĝia digna reprezento en tiu ekspozicio kaj faris trafan elekton por plenigi la du tabloformajn vitrinojn al li disponigitaj.

Unue el la du vitrinoj montras librojn - Esperantajn kaj nacilingvajn - el diversaj branĉoj de la Esperanta literaturo: lingvistika, faka kaj beletra. Jen la elite presita "Nobla Korano", la dika verkaro de Maŭ Zedong, la tiel nomata "poŝatlaso" kun Esperantigitaj geografiaj nomoj, specimena ekzemplero el la legio de Esperantaj "poemaroj" kaj la jam multe pli ol centjara, evidente senmorta "Struvelpetro" en Esperanta versio por la "verdaj" infanoj - eventuale ankaŭ por ties nostalgisentaj geavoj. Katalogo de nederlanda Esperanto-biblioteko, franclingva "Précis Interlinguistique (t.e. pri interlingvistika resumo) kaj portu gallingva ilustrita "Manual de Esperanto" (t.e. enciklopedia manlibro pri Esperanto) atentigas pri niaj sciencaj kaj movadaĵ taskoj.

Al tiuj taskoj rilatas eĉ multe pli la ekspoziciaĵoj en la dua, tuj apu da vitrino, kiu entenas ne librojn, sed muzeaĵojn en la pli propra senco: ni vidas ekzemplerojn de Esperanttekstaj bildpoŝtkartoj, komercaj kaj turismaj faldprospektoj, propagandaj glumarkoj kaj kongresinsignoj. Tre rimarkindas Esperantlingva instruo sur metalplato pri uzo de publika telefonaparato, el Nederlando - ĝis nun , bedaŭrinde, unikaĵo. Neniu afero, kiom ajn spirita, serioza, nobla, estas probable, inuma kontraŭ la kiĉo: Ĉi tiun reprezentas ventumilo "esperantisme" pripentrita por hispana Esperanto-kongreso okazinta antaŭ ok jaroj.

Mankas, do, preskaŭ nenio en tiu superrigardo, kies viziton ni emfaze rekomendas al ĉiuj esperantistoj, kiuj loĝas en Vieno aŭ vizitas ĝin dum ĉi tiuj somero kaj aŭtuno. Ĝi estas alirebla ĝis oktobro.

Dr. Karl Beckmann
ORF, Regional, Esperanto-Info
Jadde, 77-06-30

Noto: La supra artikolo estis bone aŭdebla dum la Esperanto-elsendo de ORF-Regional, ĉi tie en Nürnberg.

Citaĵo Ili ja estas niaj fratoj

Nur kvinono de la proksimume 20 milionoj da lepruloj estas hodiaŭ prizorgataj de la leprulhelpverkoj. La germana estas la plej granda tiaspeca en la mondo. En 1975 800 mil lepruloj estis stacie aŭ ambulante prizorgataj. 15 500 el ili tute resaniĝis kaj povis komenci novan vivon.

La resanigo de leprulo daŭras de 3 ĝis 5 jaroj. Oni ĉiam demandas, ĉu la helpo valoras. "Ĝi ja estas nur guto sur varmega ŝtono." Tio estas simple malvera, ĉar kontraŭe ni scias, ke "ĉiama guto kavigas la ŝtonon." Por ekzemplo: el 100 mil lepruloj en Ugando, 75 mil estas registritaj kaj estas kuracataj. Ilia resanigo estas garantiita kaj nur demando de la tempo. 15 500 resanigitaj lepruloj en 1975! Kiu povus konsideri tiom da homoj, kiujn oni redonis al la vivo "guto sur varmega ŝtono?"

El recenzo de Ernst Höpfler, Lippstadt, pri la libreto "Entrepreneo Homo" de Richard Ott.

Jan Klimek

Epigramoj

Abrakadabro! Abrakadabro !!

Daŭre Kaino murdas Ablon !!

Hom' al homo estas lupoj!

Ĉiam sur pli alta ŝtupo!

Pri la Varsovia Kastelo

Nur de vidpunktoj ĝi dependas:

Ĉu ĝi ruĝa aŭ ruĝa estas!

Rimarkigo: Al aŭskultantoj de la Esperanto-elsendoj de Pola Radio, la aŭtoro de ĉi tiuj epigramoj, Jan Klimek, Varsovio, estas bone konata: Li estas la estro de la Esperanto-Redakcio de Radio Varsovio kaj verkas kutime la "Leterkeston" kaj la "temojn de la semajno". Ni dankas al li, ke li rajtigis nin publikigi liajn epigramojn.

Antaŭanoncoj

Esperanto-Grupo Bremen invitas al suna, gaja, plezuriga ĝardenfesto por ĵaŭdo, la 14-a de julio ekde la 17-a horo, en la ĝardeno Bremen, Herminenweg 1. Informojn donas Heinz Dieter Hartig, Kasseler Str. 76, 2800 Bremen 1, Tel. 35 98 16

Svisa Kurtonda Radio

S-ro Dr. Artur Baur parolos en siaj Esperanto-elsendoj de la 18-a, 19-a kaj 21-a de julio 1977 sur la ondoj de Svisa Kurtonda Radio pri la temo "Radio-Revuo en Esperanto".

Libro de la Semajno

Vivo de laboristo en la kolonia kaj novkolonia epokoj, aŭtobiografio de J. van munster.

Formato 14,8 x 21 cm, broŝ., 112 p., prezo 15,20 DM

Mendu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1

Esperanto en Radio

Ĉiuj elsendoj escepte de Romo estis relative bone aŭdeblaj. Tamen ankaŭ Romon oni povas kapti!